

Laborplano de TEJO-Estraro

2011-2012



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Nieuwe Binnenweg 176

3015 BJ Rotterdam

Nederlando

Surbaze de kontribuoj de TEJO-estraranoj
kompilis Łukasz Żebrowski
Prezidanto de TEJO

01/11/2011

1. Enkonduko

La Komitato de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, kunveninta en Kievo dum la 67-a Internacia Junulara Kongreso, elektis estraron por la periodo 2011-2013. Jen estas listo de estraranoj kun iliaj postenoj kaj estraraj fakoj kiujn ili transprenis:

- Łukasz Żebrowski – Prezidanto, kunordigo, homaj rimedoj
- Paulína Kožuchová – Ĝenerala Sekretario, kulturo
- Alisa Nikitina – Kasisto, financoj, subvencipetado
- Sergey-Meiyer Tyrin – unua Vicprezidanto, informado
- Michael Boris Mandirola – dua Vicprezidanto, eksteraj rilatoj
- Nico Huurman – tria Vicprezidanto, aktivula trejnado, seminarioj
- Tina Tišljár – Estrarano, kongresoj
- Petra Smidéliusz – Estrarano, landa agado, edukado

Jen ni prezentas al vi laborplanon kun divido je ĉefaj agadkampoj de TEJO.

2. Kunordigo kaj homaj rimedoj

TEJO bezonas pli efikan kunordigon de organiza laboro kaj akiradon de aktivuloj. Necesas pli bona distribuo de taskoj, sed ankaŭ pli ofta kaj sukcesa kontrolo de ilia realigado. Ŝanĝojn bezonas strukturo de laboro en la estraro kaj en la komitato tiel, ke pliajn efikojn oni atingu en pli racia tempo. Gravas ankaŭ, ke TEJO havu pli bonan politikon pri homaj rimedoj, ĉar ni ĉiam suferas pro ne sufiĉa uzo de potenco, kiun havas aktivuloj membrantaj kaj membrantaj en TEJO – tial ni celas krei lokon kun anoncoj pri bezonata helpo kaj internan datumbazon pri aktivuloj.

3. Kulturo

Tiu ĉi kampo laste ne estis sufiĉe multe prizorgata de TEJO. Tion ni celas ŝanĝi per propraj iniciatoj kaj per pli aktiva (ankaŭ financa) subteno al diversaj kulturaj projektoj. Certe por tia strategio necesas ankoraŭ pliaj precizigoj, tamen konkretaj projektoj, kiujn ni nun planas estas jenaj:

- fotokonkurso por Kontakto;
- subvencioj por ARKONES kaj KEF;
- reaktivigo de Artista Datenbazo.

4. Financoj

En sfero de financoj TEJO nun estas en nova, pli komforta situacio. Okaze de dungo de TEJO-oficisto unue necesas krei novajn strategion kaj labormanierojn pri subvencipetado kaj financa administrado, tiel ke ni bone utiligu pliprofesiigon de nia organizo.

5. Informado

TEJO faras multon, sed tio ne ĉiam videblas. Plej unue indas investi je:

- informado fare de la estraro;

- regulaj eldonaĵoj (superrigardo de redaktora laboro);
- porekstera informado cele al diskonigo de Esperanto kiel komunika ilo kaj de TEJO kaj ĝia agado en rondoj ne ligitaj al Esperanto-movado;
- tenado de strukturigita kaj aktualigita tejo.org, kio ligiĝas kun ĝia renovigo;
- eluzo de kromaj medioj (aŭda, vida, ktp.) kun tauĝaj informeroj.

6. Eksteraj rilatoj

La ĉefa celo de eksteraj rilatoj estas plifortigi ligojn kiujn ni jam havas kaj akiri novajn, nome:

- daŭrigi nian ĉeeston en FoJE (Forumo Junulara Eŭropa) kaj laŭeble plifortigi kaj pliefikigi ĝin per partopreno en eventoj, lobiado kaj elektigoj;
- eltrovi ĉu eblas trovi similajn alikontinentajn platformojn;
- partopreni en kunvenoj de UNESKO klopodante igi TEJOn konata tiukadre;
- realigi komunajn projektojn kun aliaj organizoj kiel seminarioj pri komunaj interesoj aŭ aktivula trejnado.

7. Seminarioj kaj aktivula trejnado

Disigo de seminarioj kaj aktivula trejnado disde kongresoj celas pliprioritatigi aktivadon je tiu kampo. La ĉefaj prioritatoj estas:

- krei strategion pri tio kiajn aktivulojn kaj kiujn kompetentojn bezonas TEJO kaj ĝiaj sekcioj;
- funkciigi la aktivulan datenbazon, por en ĝi trovi trejnantojn inter niaj aktivuloj;
- esplori la eblecon havi komunan trejnseminarion en kiuj membroj de TEJO kaj alia(j) organizo(j) povas kune trejniĝi kaj dume lerni unuj de la aliaj;
- organizi seminarion kun alia(j) junulara(j) organizo(j) kiuj favoras al Eŭropa integriĝo por preparoli kun ili la lingvopolitikan flankon de tiu procedo;
- dum tiu seminario krei komune interkonsentitan skizon de efika kaj justa eŭropa lingvopolitiko kaj laŭeble ĝin disvastigi al pli larĝa publiko.

En la kampo de organizado de eventoj, la trejnado jam sufiĉe okazas kaj daŭre okazu en organizaj teamoj konsistante el bona mikso de spertaj kaj lernemaj aktivuloj.

8. Kongresoj

Krom IJK-kunordigado kaj servo al LKK per transdono de spertoj necesas plilarĝigi aktivadon en tiu kampo je:

- kunlaboro kun UK ĉefe pri junulara programo kaj karavano IJK-UK;
- helpo en kunordigo de aliaj junularaj aranĝoj (ĉefe en Eŭropo, tiel ke ili pli kunlaboru, ne okazu samtempe, sed en logika sinsekvo);
- informado pri junularaj aranĝoj organizitaj de LS-j de TEJO;
- starigo de administra sistemo por la IJK che tejo-servilo.

Apartan atenton necesas doni al daŭrigo de esploroj pri la ebleco organizi IJK-n en Afriko.

9. Landa agado

En rilatoj kun niaj landaj sekcioj necesas unuavice kontakti ĉiujn kaj refreŝigi informojn pri ili. La ĉefaj celoj estas:

- reorganizi la koncernan parton de tejo.org, krei kalendaron pri junularaj aranĝoj;
- por ekstereŭropaj landaj organizoj helpi pri organizado de aranĝoj, kiuj ne multas tie, sed ankaŭ pri solvado de bazaj problemoj kaj malfacilaĵoj;
- por eŭropaj landaj organizoj helpi pri varbado kaj informado, ĉar pluraj el ili baziĝas sur kelk(et)aj aktivuloj kaj ne sukcesas allogi novajn homojn.

10. Pasporta Servo

Ni planas pluvarti la servon (kaj interrete kaj papere), sed revizii la mastrumadon de la evoluigo de la servo. Krome enplekti pliajn helpantojn cele pli altan efikon, kaj havi pli klaran kaj oftan informadon pri la stato de la projekto.